Ŝarko

Ŝarko estas komuna nomo por fiŝoj kun ĥorda spino, triangula dorsa naĝilo kaj teruraj makzeloj plenaj de akraj dentoj. Ŝarkoj estas rabfiŝoj, danĝeraj eĉ por naĝantaj homoj, pro kio ilia dorsa triangula naĝilo vekas teruron, kiam ajn ĝi aperas sur la akvonivelo. Tamen ŝarkoj estas tre utilaj, ĉar ili likvidas kadavrojn kaj purigas la akvon. Ledindustrio utiligas ŝarkhaŭton, konsistantan el plurtavola epidermo kovrita per ŝarkoskvamoj.

Ŝarkoj (Selachimorpha) estas zoologia (super)ordo de tiuj bestoj. Konataj estas ĉ. 250 specioj, el kiuj kelkaj estas ovonaskaj, aliaj vivonaskaj.

Tutmonde, 21 % de ŝarkospecioj kalkulas inter la "minacataj" kategorioj, kaj 18 % estas "apud minaco". Por aliaj 35 %, ne estas sufiĉaj donitaĵoj por decidi pri ilia stato. Pli ol duono de la specioj kiuj pasigas la plimulton de sia tempo en la supraj tavoloj de la oceano, submetataj al fiŝkaptado, estas sur la minacata listo. Kontraŭleĝa ŝarkokaptado estas la ĉefa kaŭzo, sed estas laŭleĝa celata ĉasado por naĝiloj kaj viando, kaj ŝarkoj ankaŭ estas kaptitaj akcidente.

Kelkaj evoluintaj landoj efektivigis kaptolimigojn kaj restriktojn de naĝiloj.

La 25-an de septembro 2009 Johnson Toribiong, la prezidanto de Palaŭo anoncis dum seanco de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj pri malpermeso de ĉia komerca ŝarkokaptado en maroj de tiu Pacifika respubliko. Ankaŭ la prezidanto alvokis al tutmonda malpermeso de uzado de ŝarkonaĝiloj, kaj al ĉeso de la praktiko de forigo de la naĝiloj. "Ĉi tiuj bestoj estas buĉataj kaj estas eble ĉe la rando de malapero, krom se ni faras pozitivan agon por protekti ilin," diris li. "Ilia fizika beleco kaj forto, laŭ mia opinio, reflektas la sanon de la oceanoj; ili elstaras". Protektita zono havas proksimume 600 000 kvadratajn kilometrojn de oceano kaj tie vivas 130 minacataj specioj de ŝarkoj. Tiutempa aera enketo trovis fiŝkaptadon fare de 70 ŝipoj en la zono, la plimulto de ili kontraŭleĝe.

Ekspertizistoj opinias, ke palaŭa ekonomio nur profitos pro tiu malpermeso, ĉar plimulton da siaj enspezoj la lando ricevas danke al turismo. Ŝarkoj allogos plonĝistojn kaj helpos sanigi koralajn rifojn kaj ekologiajn sistemojn.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Ŝarko